

& Mia patrino:

< Rekante 31 el 59 batoj por strofo, entute 531 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Bohemaj grenatoj) dediĉe al Otakar Březina. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

(/mi mido doLa LaLa SoSo domi rere; mi mido doLa LaLa SoSo doTi dodo; mi mido doLa LaLa SoSo domi rere; mi mido doLa LaLa SoSo doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: SoSo SoSo dore mi; rere miTi doLa LaLa; SoSo SoSo dore mimi; TiTi reTi do o; SoSo SoSo dore mi; rere miTi doLa LaLa; SoSo SoSo dore mi; TiTi redo La a)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Tra viv' malgaje, kiel
pentofarantino, ; patrin' iradas mia sen
parfum' kaj floroj, ; frukt' seka, harda
estis ŝia vivdestino, ; sen refreŝiĝo pasis
ŝiaj tag' kaj horoj.

(×: 2× **Unu, du kaj tri kaj kvar ; kvin
kaj ses ni paŝas trive ; kaj per tiu
paŝa faro ; pasas tuta viv'**.)

'2 De malriĉeco polv' vangon ŝian ŝiris,
; okulojn akre tranĉis, ruĝaj de kataro, ;
amase kovris vojon, kie ŝi nur iris, ; kaj
por ŝi, jam sveninta, iĝis buduaro.

'3 Malhelaj jaroj kuŝis nur sur spino ŝia,
; pez' de klopodoj de ŝi la freŝecon
prenis, ; ŝi morton sian kisis en hor'
agonia ; kaj ŝiaj lipoj eĉ por vivo danki
penis.

'4 Revante genuadis ŝi sur preĝejplanko
; en odoranta sfer' de vakso kaj incenso
; kaj vortojn de konsol' ŝi kaptis nur
kun danko ; kaj animsavo estis ŝia sola
penso.

'5 Ho, vi, patrino mia, lum' nun
memiĝinta, ; vi, elpafita sag' en mond'
sen fin', senlima, ; de nomo via sono
estis forvibranta, ; vi tamen restis por
mi ĉiam tre proksima.

'6 De morta via sango flor' mi estas
pala, ; por kiu la nutraĵo viaj larmoj
estis, ; maldolĉa sent' de lipo via
senegala ; heredo por la tuta vivo mia
restis.

'7 Kaj kiam la silento vibras
noktomeze, ; elstaras vi el tomb' kaj
kun mi iras dormi, ; en mia propra spir'
vi spiras ritme, peze ; kaj vi en mia voĉ'
ploregas tiom por mi.

'8 En miaj vejnoj fluas varm' de korpo
via, ; bril' el okulo via en la mian iras, ;
kaj flam' de via kredo strange religia ;
animon mian tranĉas, pikas, sange
ŝiras.

'9 Kaj kiel via ankaŭ mia voj' malgaja, ;
nur seka cindrogusta frukt' en riĉa
nombro, ; la vivo sen koloro kaj sen
suno maja, ; sur ĉiu sento mia kuŝas via
ombro.)